

**Kluba Programo:****julio:**

- 4 John Wells: *Lingva Seminario* (1800h: konsilantaro)
- 11 Socia Vespero
- 16 (merkredo) 7-8:30ptm Filmo: *The Universal Language of Hope – The Floating Cinema, Granary Square Towpath, N1*
- 18 Promeno laŭ Kanalo Regent (renkontiĝo 7ptm *Kentish Town Locks*)
- 25 Klubanoj: 5-minutaj prelegetoj "Plej Ŝatataj Kvartaloj" en ajna urbo

**aŭgusto:**

- 1 David Thornell: *Franca Revolucio* (1800h: konsilantaro)
- 8 Socia Vespero
- 15 Heleno Fantom: *El la Maniko de nia Libroretaro*
- 22 Klubanoj: 5-minutaj prelegetoj "Okulfrapaj Konstruaĵoj" ĉu altega grandtemplo, ĉu eteta iglo.
- 29 John Wells: *Lingva Seminario*

**septembro:**

- 5 Socia Vespero

**Esperanta Kalendaro:**

**26 julio-2 aŭgusto:** 99a Universala Kongreso, Bonaero, Argentino <http://uea.org/kongresoj>

**26-29 septembro:** Internacia Amikeca Renkontiĝo, *the Friars*, Aylesford, Kent. Informo: Anica Page (kontaktdetaloj inverse).

**Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a aŭgusto por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

**Merkredo 16-a de Julio -**  
**Filmo "The Universal Language"**

Oni petas ke Esperantistoj ĉe-estu por respondi eventualajn demandojn de la publiko.

*There will be a screening of Sam Green's short documentary 'The Universal Language' at the Floating Cinema in London on the 16th July.*

**WEDNESDAY 16 JULY**  
**THE UNIVERSAL LANGUAGE OF HOPE**

*Esperanto is a global common language first introduced in 1887 with the utopian ideal of eradicating language barriers and fostering world peace. Learn why Esperanto continues to this day to enchant speakers the world over, and join our informal workshop to learn and try out a few of your own Esperanto phrases. The workshop is followed by a screening of Sam Green's short documentary 'The Universal Language' tracing the history of Esperanto.*


Towpath, Granary Square, apud Goods Way, King's Cross, N1C 4AA  
 Metroo: King's Cross Bileto: £5.00 (aŭ Rabatita: £3.00)  
 Informo kaj biletendo: <http://floatingcinema.info>. Klaku "Events", poste rulu malsupren ĝis vi trovos "The Universal Language of Hope".

**Vendredo la 16-a de julio: Promeno laŭ Kanalo Regent**

En la klubejo tiun vesperon okazos nenio ajn – krom se pluvos, aŭ se meteorologoj estos tiutage prognozintaj daŭran kaj/aŭ fortan pluvon. En kazo duba, bonvolu unue informiĝi telefone ĉe 07541 413989

Renkontiĝu ĉe "Kentish Town Lock" je **19.00**

De "Camden Town" sekvu "Kentish Town Road" norden ĝis la kanalo. De "Camden Road" (aŭ apuda aŭtobus-haltejo) sekvu "Camden Road" suden ĝis "Costa Coffee" apude troviĝas ŝtuparo al la kanalo. Sekvu la padon (kun la kanalo je via maldekstra flanko) sub 2 pontoj ĝis "Kentish Town Lock".



## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babilo.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la

ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB  
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,  
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,  
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB  
01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Olga Kerziouk, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com, anica\_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

LEKano **IAN FANTOM** verkis artikolon, kiun lastatempe aperigis UEA en sia prestiĝa revuo, ESPERANTO. "Jes, la Tempo por Esperanto Povas Reveni" publikiĝis en la sekcio 'Esperanto kaj Paco' (pĝ. 59), de la numero por marto 2014. La artikolo estas legindaĵo, pri la kontrastaj roloj de la Internacio Lingvo kaj la angla. S-ro Fantom traktas ambaŭ historie: Temas pri la respektivaj ideoj malantaŭ Esperanto kaj Basic English, kun emfazo rilate la kontrastajn evoluojn de movadoj por paco kaj tiuj por "English First". Gratulon al Ian! Kaj dankon al li, pro liaj pensigaj vortoj.



Menciindas du alproksimiĝantaj aferoj, kiuj meritas atenton, pro siaj nekutimecoj: (1) La Esperanto-filmo dokumenta, **THE UNIVERSAL LANGUAGE**, prezentiĝos ĉe *The Floating Cinema* en Londono – sed je **merkredo** (ne vendredo) kaj NE ĉe la Londona Irlanda Centro; (2) ni faros **Promenon laŭ Kanalo Regenta** - ja je vendredo. Por la datoj, horoj kaj lokoj de ambaŭ, bonvolu rigardi aliloke en ĉi tiu Bulteno kaj bonvolu partopreni ambaŭ!

Evidente venas la ferisezono, tiu jartempo kiam Esperantistoj forflugas dise al diversaj renkontiĝoj tra Esperantujo. Jen bono. Ni ne forgesu, tamen, ke nia kara klubo restas malferma dume - ne nur por siaj membroj, sed ankaŭ por iaj samideanoj al Londono. Ĝuste en somero, eksterlandanoj planas veni kiel gastoj al LEK, por vidi tiun famon Esperanto-klubon, kiun Zamenhof mem "alparolis" kaj laŭdis en sia *Originala Verkaro*. LEK estas sufiĉe ofte menciita (jen pro sia malnoveco, jen pro la faroj de siaj membroj tra la jaroj), ke homoj atendas ke iuj el ni estu ĉe-klubeje en julio kaj aŭgusto. Do, vojaĝu kaj revenu kun raportoj; sed dum vi ne forestas, venu vendrede por bonvenigi vojaĝantojn al LEK.

**Feliĉan Someron!**

*David Thornell*